

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Redakta komitato:

József Németh (red.)
Mireille Grosjean
Luigia Oberrauch Madella
Ahmad Reza Mamduhi
Rob Moerbeek

Kunlaborantoj de la aktuala numero:

Laura Brazzabeni
Renato Corsetti
Emmanuel Desbrières
Mireille Grosjean
Didier Janot
Reza Kheirkhah
Aranka Laslo
Stefan MacGill
Alessandra Madella
Joel Muhire
József Németh
Espoir Ngoma Kasat
Ahmad Reza Mamduhi
Patrizia Rivaldi
Gilbert Simiyu Sikalai
Renée Triolle
Yu Jianchao



Zaozhuang-Universitato festis sian Esperanto-Muzeon
(vd p.16-19.)



ENHAVO

Enkonduko (Ahmad Reza MAMDUHI)	3
Didier JANOT: <i>Esperanto kaj ILEI en la 42-a Ĝenerala Konferenco de Unesko</i>	4
Emmanuel DESBRIÈRES: <i>Juna tutmonda malnaiva entuziasmo ĉe Unesko</i>	9
<i>Retaj kunvenoj kun Mirejo</i> (Mireille GROSJEAN)	11
<i>Komisiono de TEJO pri Edukado</i> (Espoir NGOMA KASATI)	12
<i>Kiu okupiĝu pri la instruado de E-o en universitatoj kaj kial?</i> (R. CORSETTI)	14
Alessandra MADELLA: <i>Zaozhuang-Universitato festis sian Esperanto-Muzeon</i> ...	16
El la landoj kaj sekcioj (CN, FR, GH, HU, IT, KE, CD, RS, TW)	19
<i>Pri LA TEORIO NAKAMURA</i> (Intervjuo de A. Madella kun Anna Löwenstein)	29
<i>Alvoko partopreni en la 57-a ILEI-kongreso kaj Simpozio</i> (Laura BRAZZABENI) .	34
Informoj pri ILEI, adresaro de sekcioj, reprezentantoj, kontaktpersonoj	35

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto: Ahmad Reza MAMDUHI, Nr. 9, K. Iraj, Kh. Dowlatshad Gharbi, Kh. Farid-Afshar, Kh. Vahid Dastgerdi, Tehran-1916613514, Irano. Tel. +98 9122115419 (Telegram, WhatsApp). <mamduhi@gmail.com>. Universitata agado, ekstera komunikado kaj varbado, observanto kaj komitatano A ĉe UEA.

Sekretario: Elena NADIKOVA, ul. Kadikova, 24-41, RU-428037 Ĉeboksari, Rusio, Tel. +7 919-670-25-34. <lena_espero@mail.ru>. Lerneja agado.

Estrarano pri financoj: Karine ARAKELJAN, 33 Khandjian Str., Apt. 4, AM-0010 Erevan, Armenio. *ilei.kasisto@gmail.com* (financoj). Tel. +374 55 279906 (Viber, WhatsApp), <karinko_arm@mail.ru>. Ekzamenoj.

Vic-prezidanto: Alessandra MADELLA, via Prampolini 8, IT-43122 Parma, Italio, Tel. +39 0521 785582, <a.madella@tiscali.it>. Lerneja, universitata, scienca, landa kaj regiona agadoj (Orienta Azio), ekstera komunikado kaj varbado.

Estrarano pri kongresoj: Laura BRAZZABENI, via San Filippo 52, IT-58031 Arcidosso (GR), Italio. <laura.brazzabeni@gmail.com>. Tel. +39 3286461063 (WhatsApp). Lerneja agado.

Estrarano: Marija JERKOVIĆ, Jarunska 6, HR-10000 Zagreb, Kroatio. Tel. +385 981771741. <mjerkovic@net.hr>. Lerneja kaj landa agadoj.

Estrarano: Fernando PITA, Estr. Cel. Vieira 134, bl 3, ap 402; Irajá; Rio-de-Janeiro cep 21220-310, Brazilo. <magisterpita@gmail.com>. Tel. +55 21 98863-3854 (Telegram, WhatsApp). IPR, universitata kaj scienca agadoj, observanto ĉe TEJO.

Estrarano: Radojica PETROVIĆ, Bul. oslobođenja 36/14, RS-32000 Čačak, Serbio. <radojica.petrovic.rs@gmail.com>. Tel. +381 64 8525321 (Viber, WhatsApp, Telegram). Eduk-projektoj, universitata agado, instrukapablado.

Scienca Komitato

Prezidanto: Humphrey Tonkin,

Usono, University of Hartford;

AdE¹

Membroj:

Duncan Charters, Usono, Principia College, Elsah

Renato Corsetti, Britio/Italio, Università degli Studi di Roma „La Sapienza”; AdE¹

Probal Dasgupta, Barato, emerita profesoro de LRU, Indian Statistical Institute, Kolkata; AdE¹

Aloyzas Gudavičius, Litovio, Šiaulių universitetas

Boris Kolker, Usono; AdE¹

Iona Koutny, Pollando/ Hungario, Uniwersytet im. Adama Mickiewicza w Poznaniu

Stefan MacGill, Nov-Zelando/ Hungario

Aleksandr Melnikov, Rusio, Академия Сельскохозяйственного Машиностроения, AdE¹

Radojica Petrović, Serbio, Univerzitet u Kragujevcu

Balázs Wacha, Hungario, MTA Nyelvtudományi Intézet

¹ AdE – Akademio de Esperanto

Sur la titolpaĝo:

supre: Studentinoj de la Esperanto-fako de Zaozhuang-Universitato legas poemon;

malsupre: Duncan Charters, Cecily Lee kaj bangladeŝaj studentoj en la Eo-Muzeo (vd. p. 16)

Enkonduko

Karaj legantoj,

Iam la aferoj okazas tiel bone kaj ideale, ke oni pensas ĉe si kvazaŭ ili estis planitaj tute konscie de iu(j)! Ekz-e en la lastatempa Ĝenerala Konferenco de Unesko en Parizo, tute feliĉe la Ĝenerala Direktorino de la organizo, Audrey Azoulay, dum sia enkondukaĵo i.a. plendante diris: „Ne estas facile trovi komunan lingvon, kiun 194 membro-ŝtatoj povu kune paroli”! Tion bonege kaptis saĝega UEA-reprezentanto ĉe Unesko, François Lo Jacomo, por indiki komence de sia 3-minuta ora oportuno paroli al la Konferenco por prezenti Esperanton! Vere laŭdinda paroladeto. Pri tio kaj la tuta Konferenco ĉi-numere vi povas detale legi raporton de Didier Janot, ILEI-invitado al la Konferenco, kiu perle prezentas ĉion, kio okazis tie interesa por ni, lingvemaj esperantistoj!

Mi esperas, ke tia sukceso estos ankaŭ enkonduko por iniciati kaj/aŭ daŭrigi nian grandiozan kaj valoran strebadon por la tria Rezolucio por Esperante fare de Unesko. La samo validas ankaŭ pri la agnosko de la „Monda Tago de Esperanto” (la 26-a de julio) fare de la prestiĝa monda organizo.

Verŝajne la posta Ĝenerala Konferenco, kiu okazos en 2025 en Samarkando, Uzbekio, Azio, estos la ĝustaj loko kaj tempo por tiaj historiaj atingajoj por ni. Mi elkore esperas, ke ĉio okazos tiel ideale, ke oni diros: kvazaŭ ĉio estis planita por la sukceso de Esperanto!

Se vi deziras kiel ajn helpi al la realigo de tiaj ambiciaj celoj, bv. skribi al prof. Renato Corsetti (renato.corsetti@gmail.com)!

Ahmad Reza MAMDUHI

Esperanto kaj ILEI en la 42-a Ĝenerala Konferenco de Unesko

de Didier JANOT (Francio)

Ĝenerala Konferenco

En Parizo, de la 7-a ĝis la 22-a de novembro 2023, okazis la Ĝenerala Konferenco de la Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj por Edukado, Scienco kaj Kulturo (Unesko). Tiu konferenco okazas ĉiun duan jaron, novembre de neparaj jaroj, kutime en Parizo en la sidejo de Unesko. En ĝi partoprenas delegitoj de 194 membro-ŝtatoj, kiuj decidas pri agado de Unesko. Aldone estis invititaj partopreni kiel observantoj Ne-Registaraj Organizoj (NRO-j), kiuj per kontrakto helpas al Unesko atingi siajn celojn en unu aŭ pluraj el la statutaj agadkampoj; inter ili estas UEA. Kvankam ILEI ne ĝuas tiun statuson, ĝi ricevis inviton danke al sia longdaŭra agado por Monda Edukado. ILEI sendis tri observantojn.



S-ino Simona-Mirela Miculescu, Prezidanto de la 42-a Ĝenerala Konferenco

Prezidanto de la 42-a Ĝenerala Konferenco

La unuan tagon de la Konferenco, la prezidanto de la antaŭa konferenco malfermas la Konferencon. Poste la membro-ŝtatoj elektas prezidanton, kiu prezidas la debatojn kaj oficas ĝis la elekto de nova prezidanto la unuan tagon de la sekva Ĝenerala Konferenco. Estas elektita prezidanto de la 42-a Ĝenerala Konferenco S-ino Simona-Mirela Miculescu el Rumanio. Apud ŝi sidas pluraj gravuloj, interalie la Ĝenerala Direktoro de Unesko, S-ino Audrey Azoulay, kiu estras la laboron de la Organizo por plenumi la taskojn deciditajn de la Ĝenerala Konferenco.

Lingvoj

La retejo de Unesko havas paĝojn en ses lingvoj (angla, franca, hispana, rusa, araba kaj ĉina), tamen nur du lingvoj estas uzataj por la ĉiutaga laboro de Unesko (angla kaj franca) kaj multaj dokumentoj disponeblas nur en tiuj du lingvoj.

La Ĝenerala Konferenco havas specifan regularon kun ĉapitro pri lingvoj de la Konferenco. La Konferenco havas ses laborlingvojn (angla, franca, hispana, rusa, araba kaj ĉina). Dokumentoj de la Konferencoj disponeblas en tiuj ses lingvoj kaj dum la kunvenoj estas interpretado inter tiuj ses lingvoj. Se delegito deziras uzi alian lingvon, li aŭ ŝi devas provizi Uneskon per versio de sia parolado en unu el la ses laborlingvoj. Ekster tiuj oficialaj kunvenoj, en la koridoroj ne estas interpretistoj; por rekta komunikado inter delegitoj necesas elturniĝi. Mankas komuna neŭtrala lingvo! Unu el la taskoj de la delegitoj de UEA kaj ILEI estas konsciigi la delegitojn pri tio.

Notindas ke la regularo ankaŭ priskribas oficialajn lingvojn de la Konferenco. Al la ses laborlingvoj aldoniĝas la hindia, la itala kaj la portugala. Tiu statuso estas ĉefe formala, ĉar tiuj aldonaj lingvoj ĝuas neniun praktikan avantaĝon. Membro-ŝtato rajtas proponi aldonon de oficiala lingvo. Ĉi-foje Indonezio petis, ke la indonezia lingvo fariĝu oficiala.

Indonezia lingvo

Indonezianoj loĝas sur 17 500 insuloj kaj parolas 718 lokajn lingvojn. En 1928 la indonezia lingvo (Bahasa Indonesia) ricevis agnoskon dum junlarkongreso kaj en 1945 ĝi fariĝis oficiala lingvo de Indonezio. La indonezia havas trajtojn de artefarita lingvo interalie kun afiksoj. Ĝi funkcias

kiel lingvafrankao por 275 milionoj da parolantoj, el kiuj granda plejmulto parolas ĝin kiel duan lingvon. Ĝi ankaŭ estas parolata en najbaraj landoj.

Konforme al la regularo de la konferenco, Indonezio prezentis proponon, por ke la indonezia lingvo fariĝu oficiala lingvo de la Konferenco. Unue la propono venis al jura komisiono, malgranda grupo de fakuloj, kiu traktis la proponon laŭ jura vidpunkto. Indonezio prezentis la proponon kaj promesis zorgi pri ĉiuj kostoj de necesa tradukado. La jura komisiono aprobis la proponon el jura vidpunkto kaj la propono iris al plena kunsido por decido. En plena kunsido, la membro-ŝtatoj unuanime akceptis la proponon. Nun la Ĝenerala Konferenco havas dek oficialajn lingvojn.

Agado dum la Konferenco

Dum la konferenco okazas formalaj kunvenoj en la ĉefa salono kaj laborkunvenoj en aliaj salonoj, interalie de komisionoj. Estas grandaj komisionoj kiel por edukado, scienco, kulturo, kaj pli malgrandaj por diversaj temoj. Observantoj de NRO-j rajtas ĉeesti en preskaŭ ĉiuj el tiuj kunvenoj eĉ en la jura komisiono, kiu traktis la proponon pri la indonezia lingvo. Okazas ankaŭ aliaj kunvenoj, kiel tiuj de landaj komisionoj por Unesko, de partneroj kaj de NRO-j en rilato kun Unesko.



De maldekstre: Gilles Tabard, Didier Janot kaj Emmanuel Desbrières, observantoj por ILEI

Kontraŭe al la Internacia Konferenco de Ne-Registaraj Organizoj, kie eblas havi budon dum la evento, tio ne okazas dum la Ĝenerala Konferenco. Do eblas rilati kun delegitoj nur iom hazarde dum neformalaj kunvenoj aŭ en la koridoroj.

Esperanto ĉe Unesko

Ekde la dua tago, dum kvin tagoj okazas Debato pri Ĝenerala Politiko. Dum tiu debato ĉiu membro-ŝtato rajtas paroli dum ses minutoj. Entute 163 el ili alparolis la Konferencon. Aldone al la membro-ŝtatoj, la estraro de la Konferenco permesis al pluraj observantoj, interalie al NRO-j, alparoli la Konferencon dum tri minutoj. En tiu kadro Universala Esperanto-Asocio (UEA) ricevis permeson alparoli la Konferencon sabate matene. Nome de UEA, François Lo Jacomo brile parolis pri Esperanto proponante helpon al Audrey Azoulay, Ĝenerala Direktoro de Unesko, kiu en sia enkonduko al la Debato pri Ĝenerala Politiko diris, ke ne estas facile trovi komunan lingvon, kiun 194 membro-ŝtatoj povu kune paroli. Fine la Prezidanto de la Ĝenerala Konferenco, S-ino Simona-Mirela Miculescu, dankis en Esperanto al François Lo Jacomo per la vorto: „Dankon!”.

Landaj komisionoj

En la mondo funkcias 199 landaj komisionoj por Unesko. Starigitaj de landaj registaroj, tiuj komisionoj kunordigas agadojn por la celoj de Unesko je landa nivelo kun partneroj interalie kun NRO-j. Landaj Esperanto-asocioj kaj ILEI-sekcioj povus (eĉ devus) kunlabori kun sia landa komisiono!

Alianco de landaj komisionoj kaj urboj kun asociitaj lernejoj en Afriko

Kunordigita de la Ĝenerala Sekretario de la Maroka komisiono por Unesko kaj de la vic-urbestro de Bouaké en Ebur-Bordo, Afriko havas nun naŭ membrojn. Dum la Konferenco la alianco kunvenis por prepari aliĝon de novaj Afrikaj komisionoj kaj organizi sian laboron. La Alianco celas kunlabori kun lernejoj el Afriko.

Afriko estas aktiva mondo-parto kaj por Unesko-agado kaj por Esperanto-agado. Ni kunlaboru!



S-ro Jamal Eddine EL ALOUA, Ĝenerala Sekretario de la Maroka Komisiono por Unesko, prezidas la kunvenon de Alianco de landaj komisionoj por Unesko kaj lernejoj en Afriko

Asociitaj lernejoj

En 182 landoj 12000 lernejoj kunlaboras por komuna celo: kreskigi spiriton de paco ĉe infanoj kaj junuloj per konkretaj agadoj. Tiun reton de asociitaj lernejoj kunordigas je landa nivelo la landaj komisionoj por Unesko.

Per Esperanto ni helpu internaciajn rilatojn de lernejoj en la mondo!

Samarkando, Uzbekio, gastigos la 43-an Ĝeneralan Konferencon

Kutime Ĝeneralaj Konferencoj de Unesko okazas en Parizo en la sidejo de Unesko. Ĉi-foje venis invito de Uzbekio organizi la 43-an Ĝeneralan Konferencon en la urbo Samarkando. Post studo de la propono, la temo venis al la plena kunsido la lastan tagon de la nuna Konferenco kaj la delegitoj akceptis la inviton. En 2025 la 43-a Ĝenerala Konferenco okazos en Samarkando, Uzbekio.



Ek al Samarkando en 2025!

Juna tutmonda malnaiva entuziasmo ĉe Unesko

de Emmanuel DESBRIÈRES (Francio)

La 14-an de novembro, paralele al la 42-a Ĝenerala Konferenco, okazis vigla evento: **Malferma Ceremonio de la Junulara Forumo.**



„Junuloj havas voĉon, necesas nur doni spacon por aŭdi ilin”

de Gabriela RAMOS, kunhelpa Ĝenerala Direktorino pri sociaj kaj homaj sciencoj ĉe Unesko

Oni povas legi sur la retejo de Unesko: Junulara Forumo de Unesko estas **esenca parto de la Programo „Junularo” de Unesko.** Ĉiun duan jaron, ekde 1999, oni malfermas spacon al junuloj, por ke ili dialogu inter si kaj kun Unesko kaj permesas disvastigi siajn entuziasmon kaj kreemon. Estas unika okazo por junuloj prezenti ne nur siajn

defiojn, sed ankaŭ siajn ideojn kaj solvojn al Ŝtat-membroj, dum la Ĝenerala Konferenco, la plej alta decidpova instanco de UNESKO.

La Junulara Forumo estas prilaborata por kaj de la junuloj mem.

Tion oni bone vidis, kaj ĝuis, dum la Malferma Ceremonio.

Bunta, vigla, mojosa ceremonio... sed la gravega temo estis: **Socia efiko de la klimatsanĝiĝo kaj neceso de justa klimat-transiro.**

Venis pluraj junaj aktivistoj sur la scenejon, interalie:

- Alice PATAKO, tradicie vestita, parolis je la nomo de indiĝenaj popoloj de Orienta Brazilo.
- Ousseynou GUEYE klarigis la ligan inter klimatsanĝiĝo kaj migradoj el Senegal.
- Luisa NEUBAUER el Germanio, fondinto de „Vendredoj por estonteco” (*Fridays for future*).
- Maya GABEIRA, ondorajdistino, Unesco-ĉampionino pri Oceano kaj Junularo, atestis pri sia sperto kiel defendistino de la oceanoj kontraŭ plast-poluado.



Ili parolis al plenplena salonego de junaj aktivistoj el la tuta mondo: Azio-Pacifiko, Afriko, Latina Ameriko kaj Karibio, Arabaj Ŝtatoj, Eŭropo kaj Norda Ameriko. Rimarkinde estas ke junuloj decidis kunsidi libere, laŭvole, kaj hazarde en la salonego sen ŝtata ŝildeto sur tablo, do sen sekvi la alfabetan kaj protokolanan vicon. Ili ne ĉiam parolis

angle. Pluraj esprimis sin ankaŭ en la franca, la hispana kaj la ĉina. Kaj ĉe delegitino en la ĉeestantaro petis paroli en la portugala... Kaj surprize, ĉar la portugala ne estas labor-lingvo ĉe Unesko, en traduk-kasko aŭdeblis traduko el la portugala al la franca. Mi ne scias, ĉu la tradukon oni ricevis ankaŭ en la aliaj labor-lingvoj: la angla, araba, ĉina, hispana, rusa.

Tiu ritma evento daŭris 3 horojn kaj finiĝis post videa mesaĝeto de la sud-korea bando Seventeen, per komuna foto, ĉiuj sur la scenejo. La simbolo estas tikla: ĉiuj kune estas aktoroj de la ŝanĝo!

Mi gardas la mesaĝon de Camille ETIENNE, franca aktorino kaj aktivisto, kiu sursceneje rolludis tekston:

„Kiam oni serĉas forlasi nian dependecon de fosiliaj energifontoj, oni laboras por paco. La ekologia batalo unue estas batalo por paco kaj libereco”.

Posttagmeze delegacio de la junaj delegitoj kunsidis kun 30 ministroj pri edukado el la tuta mondo - **esperante ke oni aŭdis ilin...**

Esperante ke oni aŭdis ilin...

La tuta malferma ceremonio spekteblas ĉe Jutubo: „UNESCO Youth Forum - Opening Ceremony - 14 November 2023”

Retaj kunvenoj kun Mirejo

Fine de 2022 mi aŭdis alvokon de ILEI distrumpetatan de diversaj retumantoj: en ĉiu lando devas esti reta kurso de Esperanto! Tia kurso ne ekzistas en Svislando. Ekzistas ĉeestaj kursoj unufoje monate organizitaj de CDELI en la urba biblioteko de La Chaux-de-Fonds. Ekzistas diversaj kursoj en diversaj lokaj kluboj. Plie Svisoj havas la eblon uzi la paĝarojn lernu.net aŭ Duolingo. Do mi akiris la konvinkon, ke iu povas bone lerni nian lingvon, se venas al li aŭ ŝi emo fari tion.

Tamen io mankas: la eblo aŭskulti, bani sin en la lingvo, paroli senĝene, kun eraroj, simple kaj amike, kiel tio okazas en kongresoj kaj renkontiĝoj, en neformalaj momentoj. „Antaŭ ol majstri lingvon, oni devas masakri ĝin” diras itala proverbo. Do ni parolu, kun eraroj, ne gravas, ni parolu. Laŭ tiu konstato Katalin Kováts lanĉis la efikan programon *Ekparolu!*, troveblan ĉe www.edukado.net.

De 2020 mi foje partoprenas la retajn kunvenojn organizitajn de s-ro Yamakawa en Tokio. Komence li faris tion fizike en la sidejo de Japana EO-Instituto, kaj transiris al retaj kunvenoj pro la pandemio. Frumatene mi povas esti rete kun miaj japanaj amikoj dum agrabla kunveno neformala.

Laŭ tiu modelo mi lanĉis komence de 2022 miajn retajn kunvenojn dufoje monate. Teorie ili estas por la membroj de Svisa Esperanto-Societo, sed kompreneble ili estas malfermitaj al iu ajn kaj pri ĝi aperas sciigo en www.eventaservo.org. Dek ses kunvenoj okazis tra la jaro 2023 kun ses ĝis dek du partoprenantoj el la tuta mondo. Venadas homoj el Argentino,

Pollando, Italio, Bulgario, Hispanio kaj kelkaj svisoj, inter aliaj maljuna virino en hejmo, kiu ofte partoprenas sen paroli.

Por meti kadron al la parolemuloj la regulo estas, ke ĉiu prezentaĵo ne estu pli ampleksa ol 16 minutojn longa. Mia inspiro estis *Ted-Talks*¹, kiuj same estas limigitaj en sia daŭro. Niaj retaj kunvenoj estas malTEDaj. Mia amiko Yamakawa avertis min: „Dum mi havas malfacilaĵon paroligi japanajn komencantojn, vi devos bremsi kelkajn el viaj partoprenantoj”. Kaj tio efektive okazas: kelkaj brile parolas kaj parolus dum horoj... La rezulto estas duhora kunsido kun tri, kvar prelegetoj; demandoj kaj debato sekvas ĉiun kontribuajon.

Por helpi al tiu kuraĝa ekparolado mi ne korektas la erarojn, kiam mi aŭdas ilin, sed poste skribas retmesaĝon al la persono por doni gramatikajn klarigojn. Por helpi al tiu libera parolado publika, mi promesas ne registri. Ĉiuj indikoj pri la disvolviĝo de la kunvenoj kaj la horaro, de la 17-a ĝis la 19-a horo laŭ la horzono en Svislando, aperas en www.eventaservo.org.

Komprenble la horo 17-a en Svislando ne konvenas al azianoj. Post kontakto kun japanoj kaj koreoj mi nun decidis lanĉi samajn kunvenojn por azianoj je la 12-a horo tagmeze en Svislando, tio estas je la 20-a horo vespere en Seulo aŭ Tokio. La unua tia kunveno okazos la 24-an de januaro 2024. Ni vidos, ĉu niaj foraj samideanoj deziros kunveni senĝene, esprimi sin per nia lingvo por progresi. Datoj aperas en www.eventaservo.org. Bonvenon al ĉiuj, ĉu babilemaj, ĉu silentemaj sed aŭskultemaj, ĉu en Vjetnamio, aŭ Filipinoj, ĉu en iuj aliaj mondregionoj.

Mireille GROSJEAN, Svislando

Komisiono de TEJO pri Edukado

Jam estas oportuno reale agadi kaj konservi spurojn, kiuj servos kiel tre bonaj bazoj por vere fekunda agado. Dediĉi sian tempon al la Esperanto-movado, estas unu el la plej indaj abnegacioj, kiujn homoj lernintaj Esperanton oferas al la Esperanto-movado.

¹ TED, mallongigo de Technology, Entertainment, Design (Teknologio, Amuzo, Dezajnado) estas serio de diverslandaj preleg-eventoj, kies registraĵoj estas libere spekteblaj kaj elŝuteblaj, kun frapfrazo "Disvastigindaj ideoj". Ĉiu prelego daŭru maksimume 18 minutojn. Nun estas pli ol 2000 prelegoj en almenaŭ 100 lingvoj. Ĉiu prelego subtekstigeblas diverslingve per interesatoj (*ted.com*).

Esperanto disvastiĝas tra la mondo ĉiutage, tio estas la plej mejlŝtona altruisma ada laborego de esperantistoj de diversaj aĝoj.

La Esperanto-movado ja bezonas volontulojn por antaŭeniri, kvankam necesas, kiel en aliaj lingvoj, normaj reguloj por instrui homojn pri Esperanto. Evidentiĝas ke la plejmulto de la Esperanto-instruantoj ne estas profesiaj lingvo-instruistoj, nek trejniĝis pri la instruado de lingvo, tamen ili estas kuraĝemaj kaj obstinaj homoj, kiuj kortenas la idealon de la esperantismo kaj decidas diskonigi ĉi tiun valoregan pontlingvon.

Jen kion ni malkovris post diskutoj en diversaj fadenoj

- Ni ne povas forbari la instruantojn, kiuj eĉ sen instrua sperto decidas disvastigi Esperanton, ĉar ni certe bezonas homojn por antaŭenpuŝi nian movadon, do ni devas resti kun tiuj.
- Multaj esperantistaj instruistoj, ĉefe en Afriko, bezonas lingvo-plibonigon! Ili instruas per iom da kono havata, ĉiam tia, ne progresanta; ili estas eternaj komencantoj kaj ja volas instrui al komencantoj la lingvon, kia heroeca sindono!
- Lern- kaj instru-materialoj mankas al multaj instruistoj bedaŭrinde tre kortuŝe, mankegas al ili ankaŭ instru-metodoj taŭgaj kaj adaptitaj al iliaj situacioj

Pro tio, la Komisiono de TEJO pri Edukado, ekmalkovrinte tion, kio okazas ĉe junaj esperantistoj de la internacia lingvo Esperanto, elpaŝis aliritme kaj elpensis novajn respondajn rimedojn por tio. Tamen ĉio devas okazi en plena kaj absolute regula kunlaboro kun ILEI.

Jenaj estas la tiurilataj planoj de la Komisiono de TEJO pri Edukado:

1. Registrado de ĉiuj junaj esperantistaj instruistoj

Estis lanĉita alvoko al registrado de E-kluboj gvidataj de junuloj ĉie en la mondo. Ni celas konservi arĥivojn por nia Komisiono kaj, laŭbezzone, estu facile atingi instruiston en certa regiono, kiam ne venas informoj de tiu klubo. Retaj kaj ĉeestaj kluboj estas inkluzive koncernataj.

2. Okazigo de KLUBA VIVO

Kluba vivo estas nova programo de la Komisiono de TEJO pri Edukado, kiu celas trejni junajn esperantistajn instruistojn pri diversaj instru-metodoj kaj estigi fortan kunlaboron inter ILEI kaj la Komisiono de TEJO pri Edukado. Kluba vivo povas okazi ĉu rete aŭ ĉeeste, preferinde rete, kie multaj povas partopreni. La Komisiono invitos laŭvice junulon por prelegi pri tio kiel li/ŝi instruas Esperanton en sia klubo, same estos invitita ILEI-spertulo por alporti lumon al la metodo uzata de la junulo kaj eĉ proponi novajn pli taŭgajn

metodojn. Tiu programo komenciĝos en januaro kaj okazos aŭ ĉiu-monate aŭ ĉiun duan monaton.

3. INSTRUISTA KAFOPAŬZO

Ĝi estas programo, kiu celas doni oportunon ankaŭ al junaj esperantistaj instruistoj esprimi ion pri siaj instruaj agadoj. Aŭ inviti spertulon prelegi pri iu specifa temo.

Tiu ĉi programo regule okazas ekde la pasinta jaro, kaj daŭre okazos. Ni estas en kunlabora kontakto kun kelkaj ILEI-spertuloj.

Kunlaboro inter ILEI kaj la Komisiono de TEJO pri Edukado estas tre dezirinda, ĉar la junularo nun lanĉiĝinta en la instruadon de Esperanto bezonas pli da klero kaj sperto pri la agadfako, al kiu ili dediĉas sin, kaj tion ili ja povas akiri de ILEI.

*Komisiito de TEJO pri Edukado,
Espoir NGOMA KASATI*

Kiu okupiĝu pri la instruado de Esperanto en universitatoj kaj kial?

Laŭ la 4-a artikolo de la Statuto de ILEI ne estas duboj:

TASKOJ POR ATINGI LA CELOJN

4.1 Unuigi instruistojn kaj instruantojn esperantistajn en la mondo por sisteme labori por la enkonduko de Esperanto en ĉiuspecajn lernejojn kaj por celtaŭga instruado de Esperanto.

Ĉiuspecaj lernejoj signifas instruejojn de infanvartejoj al universitatoj, kaj la celo estas 'enkonduko de Esperanto', alivorte de kursoj pri Esperanto. En universitatoj oni trovis ankaŭ sciancan figo-folion per la vorto 'interlingvistiko', kiu sonas pli science.

Kompreneble ankaŭ aliaj instancoj okupiĝas pri agado en universitatoj kaj altlernejaj medioj, sed kun propraj celoj. ESF preferas emfazi lingvistikajn studojn, se eble, en la angla kaj prezenteblajn al la internacia lingvista mondo. CED de UEA preferas emfazi esperantologiajn konferencojn, kie oni klarigas kial birdoj flugas kontraŭ fenestrojn dum fiŝoj naĝas kontraŭ fluoj kaj similajn lingvajn problemojn. TEJO mem en siaj momentoj de agado interesiĝas pri studentaj kluboj en universitatoj.

Do, restas por ILEI la vera laboro: instrui Esperanton kaj ni faru ĝin.

Tiucele funkcias ĉe ILEI labor-grupo, kiu provas esti de ILEI-UEA-ESF, kiu provas trovi la esperantistojn, kiuj laboras en universitatoj, kontakti ilin, laŭeble kunlaborigi ilin inter si kaj kun la respektivaj ILEI-sekcioj en la unuopaj landoj. La kunlaboro inter universitataj instruistoj kaj instruistoj de normalaj lernejoj en niaj landaj sekcioj povas esti tre fruktodona, ĉar la prestiĝo de universitataj kursoj permesas malfermi pordojn en la normalaj lernejoj. Samtempe universitataj studentoj estos verŝajne la instruistoj de morgaŭ aŭ povos favori Esperanton en siaj postaj profesioj.

Konklude ni multigu la kursojn pri Esperanto en universitatoj. Se vi konas laboranton en universitato, kiu estas esperantisto, informu la prezidanton de ILEI.

Kunsido de la laborgrupo, 2024-01-08

La kunveno kulpensiga de la 8-a de januaro 2024 estis aparte interesa. Partoprenis pli ol 10 gekolegoj. Unue Philippe Planchon donis informojn pri la kunveno pri konstruitaj lingvoj okazonta la 4-an kaj 5-an de julio 2024 en Orléans, Francujo. Vidu ĉi tie: <https://icon2024.sciencesconf.org>. Sekvis raporto de Viko pri la stato de la kurso pri E-o por universitataj profesoroj en Seviljo kaj pri la kunveno en Hispanio pri Afriko kaj pri malkoloniado de la komprenoj pri Afriko, en kiu estis prezentataj du filmetoj produktitaj de e-istoj (pri la universitato Espero en DR Kongo kaj pri la virina esperantista movado en Afriko: https://www.youtube.com/watch?v=Vv_doqUt_nU kaj <https://www.youtube.com/watch?v=c7GOTCKiVpg>.)

Poste oni parolis pri la unua leciono de la kurso pri enkonduko al interlingvistiko de Ahmad Mamduhi kun interŝanĝo de informoj kun Chistian Lavarenne, kiu promesis interveni, kiam oni parolos pri la interlingvoj de la antikveco, ĉar li doktoriĝis pri la sanskrita kaj krome li promesis liveri materialon pri Balaibalano.

Aldone, Ahmad donis informojn pri reaktivado por ekigi novan modulon titolitan „Esperanto-Tradukado” en la Scienc-Aplika Universitato en Irano; temas pri ĉ. 270-hora kaj proksimume 15-studunua modulo, kiu daŭru ĉ. 8 monatojn. Giridhar Rao prezentis la kunvenon 'Hajderabada Literatura Festivalo' kun aparta atento al lokaj lingvoj, en kiu li partoprenos baldaŭ kaj en kiu li havos eblon informi pri Esperanto: <https://www.hydlitfest.org/>. Nia

kolegino Arko klarigis pri la ceremonio en la universitato Zaozhuang kun ĉeesto de la prezidanto de UEA.

Renato CORSETTI

Zaozhuang-Universitato festis sian Esperanto-Muzeon

de Alessandra MADELLA (Italio)

La 10-an de decembro 2023 okazis la multe atendata celebrado por la dekjariĝo de la Esperanto-Muzeo ĉe Zaozhuang-Universitato. Temis pri granda evento, kun pli ol cent esperantistaj gastoj el diversaj partoj de Ĉinio, krom Islando, Italio, Japanio, Mongolio kaj Svislando. Plenis la salonon pliaj 400 gestudentoj, inkluzive el Bangladeŝo, Rusio kaj el multe da aliaj landoj. La ĉefaj gastoj estis la prezidanto de Universala Esperanto-Asocio kaj iama prezidanto de ILEI, Duncan Charters, kune kun sia edzino Cecily Lee. Sekvis kun sia tuta stabo la prezidanto de Ĉina Esperanto-Ligo, Liu Dawei. Enkondukis kaj ĝisfine gvidis la ceremonion la rektoro mem de Zaozhuang-Universitato, Li Wenxi.



Alte taksis la Muzeon Ragnar Baldursson, eksa asista ambasadoro de Islando en Ĉinio kaj ministra konsilanto pri ĉinaj aferoj, kiu partoprenis en ĝia fonda ceremonio kaj donacis 600 librojn de sia patro Baldur Ragnarsson, elstara Esperanta poeto. Ne fizike sursceniĝis, sed kompreneble majstre reĝisoris la tutan feston dum monatoj, Sun Mingxiao (Semio). Li estas la vera motoro de la muzeo dank' al siaj organizaj kapabloj kaj nelacigebla entuziasmo, kiuj sukcesis persvadi la regantojn de la universitato pri la avantaĝoj, kiujn Esperanto povas porti por videbligo en la tuta mondo. Tiujn kvalitojn certe rekonis *La Ondo de Esperanto*, kiu ĵus donis al li la titolon de la „Esperantisto de la jaro 2023”.



En la dua parto de la ceremonio multe da gastoj montris sian varman subtenon al la Muzeo donacante valorajn Esperantaĵojn. Liu Donhong, ekzemple, venis el Japanio por transdoni al vicrektoro Li Muhai la librojn de sia forpasinta edzo, Sasaki Teruhiro. La varma instruado de la karmemora profesoro kaj lia klera esperantigo de la verkoj de ĉinaj klasikaj filozofoj multe helpis altigi la prestiĝon de Esperanto en provinco konata kiel naskiĝloko de Mozio kaj Konfuceo, krom kiel loĝloko de Mencio. La gestudentoj de la Esperanto-fako de Zaozhuang-Universitato ricevis, do, grandan impreson de ŝi kaj de ŝiaj kuraĝigaj vortoj. Sed la listo de la donacintoj multe pli longas. Bao Lin, vicprezidanto de la Zhejiang-a

Esperanto-Asocio, surprizis la publikon portante sur la scenejon grandan valizon plenplenan de valoraj Esperantaj filatetaĵoj, kiujn li kolektis dum sia tuta vivo. Unikaj kontribuoj venis ankaŭ el Mongolio kaj multe da aliaj provincoj de Ĉinio. Ĉiuj donacoj klare sentigis, ke la ekzisto de la muzeo estas grava por la generacio de esperantistoj nun iom maljuniĝanta, sed ankoraŭ plena je energio kaj espero por la estonteco. Tial ili varme rigardas la junulojn de la kvarjara Esperanto-fako de Zaozhuang-Universitato, kiu havas en la Muzeo sian idealan bazon.



Surfote (de maldekstre): Arko, Duncan Charters, Cecily Lee kaj Alessandra

Duncan Charters kaj Liu Dawei helpis doni al tiu deziro pli institucian formon kune malkovrante orumitan ŝildon kun la titolo „Azia Biblioteko de Universala Esperanto-Asocio”. Kiel Duncan Charters klarigis, tiu paŝo simpligos la alvenon al Zaozhuang de duoblaĵoj de Biblioteko Hodler kaj ebligos venigi spertajn fakulojn por igi la riĉajn materialojn pli facile traserĉeblaj ankaŭ fare de ne-ĉinoj kaj tiel disponeblaj al la tuta mondo. Al tio certe aldoniĝos la kontribuo de la gestudentoj, kiuj estas nun magistriĝantaj pri interlingvistiko en Poznano. Se Eŭropo lastatempe aldonis al la Aŭstria Nacia Biblioteko la Polan Nacian Bibliotekon en Varsovio, ankaŭ Orienta Azio povos profundigi per novaj vojoj sian Esperanto-esploron kaj eble eĉ altiri esploristojn de aliaj partoj de la mondo. En la ĉina kunteksto tiu evoluo povus signifi ankaŭ novajn postenojn por trejnitaj Esperanto-fakuloj. El tiu vidpunto, indas substreki la ĉeeston en la ceremonio de tri altrangaj reprezentantoj de la Centra Oficejo de Kulturaj Restaĵoj en Pekino, kiuj pozitive rimarkis la senĉesan gravecon de Esperanto en kernaj momentoj de la ĉina moderna historio.

Ankaŭ la gestudentoj de la Esperanto-fako alportis sian kontribuon al la festo, ne nur per la finaj notoj de „La iamo longe for”, sed ankaŭ per sia ĥora legado de poemo de Armand Su, kies verkoj kaj tajpmaŝino estas inter la trezoroj de la muzeo. Post la celebrado la ĉeestantoj sekvis Sun Mingĝiao en la vizito de la Esperanto-Muzeo, bele tagmanĝis en universitata restoracio kaj vizitis la Esperanto-Arbaron en la suda parto de la urbo por partopreni en la solena dediĉo de memoriga ŝtono. Se la malstreĉa promonado tra la arbaro donis al la gestudentoj iom da kuraĝo alparoli Duncan kaj Cecily, la tagon poste ili ricevis la donacon povi pasigi tutan horon kun ili, farante al ili demandojn pri iliaj impresoj pri la Muzeo, interkultura komunikado, la estonteco de Esperanto aŭ ĝia ekonomia uzeblo. Tiom granda estis la impreso de tiu konversacio, en kiu partoprenis ankaŭ Gong Xiaofeng (Arko), ke mi decidis igi ĝian re-ludadon la unua parto de ilia fin-semestra ekzameno, kiam la studentoj devos ne nur fari demandojn, sed ankaŭ doni la respondojn. Kiel ajn estos ilia estonta vivo, mi certas, ke ili malfacile forgesos tiun valoran horon kun bele parolantaj, spertaj kaj afablaj instruistoj, kiun la festo de la Esperanto-Muzeo donacis al ili.

El la landoj kaj sekcioj

Ĉinio

Revenis la varmo kaj sankta sento - PEA celebris la Zamenhof-Tagon

La 18-an de decembro Pekina Esperanto-Asocio okazigis la ceremonion memore al la 164-a naskiĝdatreveno de Zamenĉjo kaj celebre al la Tago de la Esperanto-libro, kaj samtempe gloris sinjoron Li Weilun, kies nomo ekaperis sur la nomliston de la Panteono de la retejo *edukado.net* ĝuste la 15-an de decembro 2023.

Pekina Esperanto-Asocio kutime festas la Zamenhof-tagon ĉiujare fizike en la formo de scienca forumo kadre de la urba Federacio de Soci-Sciencaj Rondoĵoj. Ekde la unua fojo, kiam oni devis virtuale kunveni, la kunveno radias al ĉiuj direktoj de la lando. Ĉi-foje kiam la kunveno okazis hibride, alvenis virtuale samideanoj ankaŭ el Tianĵi, Hubei, Jiangxi, Yunnan, Shangdong, Heilongjiang kaj aliaj regionoj. La ĉefkunvenejo estas ĉe plej luksa pensiulejo Taikang, kie estas E-kurso gvidata de sinjoro Li Weilun. Ĉiuj gekursanoj estas pensiuloj aĝantaj pli ol sesdek jarojn.

La prezidanto de PEA sinjorino YU Jianchao faris simplan paroladon. Ŝi konigis la du librojn proponitajn de ILEI por la Tago de Esperanto-libro. En sia parolo, sinjorino YU konigis ankaŭ pri ILEI kaj la retejo *edukado.net* per

bildoj. En la nomo de PEA kaj la landaj esperantistoj ŝi donis gratulon al sinjoro Li Weilun pro lia panteonaniĝo.



Sinjoro Li Weilun estis profesoro de Pekina Lingva kaj Kultura Universitato kiel instruisto de la hispana lingvo kaj tuj post esperantistiĝo en 1979, li ekinstruis Esperanton en- kaj ekster-universitate. Li eĉ daŭrigis la instruadon post emeritiĝo. Liaj lernantoj de Esperanto supozeble atingis dudek mil. Li kompilis kelkajn lernilojn: *Elementa Kurso de Esperanto*, *Moderna Esperanto*, *Moderna Esperanto por Infanoj* ktp. Li estas dumviva membro de UEA, Honora membro de ILEI (2012) kaj Eksprezidanto de la Pekina Esperanto-Asocio. Kie ajn li estas, tie li semas. Nun li lokas sian kurson en pensiulejon, kie li ekloĝis en marto pasint-jare.

Sinjoro Li Weilun deklamis sian nove verkitan ĉineskan poemon kaj gvidis siajn gekursanojn kunkanti esperante. La maljunaj komencantoj bone parolis simple esperante por sinpresentado. Membroj de PEA Fortego kaj Goĝojlo prezentis ĉinan folkloran kruc-dialogon (ĝi similas al „talkshow”, t.e. „parol-aŭ babil-spektaklo”). Oni spektis videe la teatraĵeton Esperantan *Tigrokapaj Ŝuoj* prezentatan de infanoj el Pekina Yongtai-elementa Lernejo, ankaŭ en kiu la E-instruadon enkondukis sinjoro Li Weilun antaŭ pli ol dek jaroj.



Fine estis kunsido. Sinjorino Shang Jinling el Tianjin, kiu ĉinigis partojn el la legaĵo *La Grandaj Filozofoj kaj la Universala Lingvo* por varbi legantojn, diris, ke maljuniĝante, ŝi des pli diligente laboras por Esperanto, ĉar ŝi eltrovis feliĉon en nia bela lingvo; sinjorino Aroma el Wuhan emocie voĉlegis jenan poemon:

*En Esperantujo ne estas maljunulo
pro la fakto, ke Esperanto ja donas junecon al sia studanto
tiu, kiu lernas nian lingvon
eterne radias je la juneco.*

La poemon verkis nia karmemora sinjoro Hu Guozhu, kies nomo eterne restas ankaŭ en la Panteono.

La ceremonio daŭris du horojn kaj denove vekis en ĉies koro varmon kaj sanktan senton sub verda standardo, malgraŭ la neĝega kaj frosta vintro.

YU Jianchao (Terana)

Francio

Dek kvinminuta prezento de Esperanto al francaj lerneĵanoj

En Marseille (suda Francio) studentoj de la faka altlernejo Centrale, kiu preparas inĝenierojn, helpas dum la tuta lerneja jaro lerneĵanojn en malfacilaj kvartaloj, kie loĝas ĉefe enmigrintoj, do el malalta socitavolo. Estontaj inĝenieroj helpas ilin fari la hejmajn taskojn, sed ankaŭ malfermas ilin al interkulturo, kaj edukas al francaj valoroj (egaleco inter viroj kaj virinoj, civitaneco ks.). La 25-an de novembro ili organizis „grandan kvizon”. La

principo estas simpla: dum 15 minutoj, lernejanoj vizitas atelierojn kaj fine kvinope devas respondi demandojn. Esperanto-Marseille estis invitita kun asocioj pri klimato, seksegaleco, civitaneco kaj *SOS-méditerranée* (kiu savas migrantojn). Ni rapide prezentis la lingvo-problemon en la mondo (8300 lingvoj por 197 landoj; premo de la lingvo de la plej forta lando kaj diskriminacio), verboj en Esperanto (6 finaĵoj kompare kun la 3800 en la franca lingvo), derivado (unu radiko, dum en la franca necesas lerni 2 aŭ pli), uzo de Esperanto. Ses klasoj de 15-jaruloj sin sekvis, la lernejanoj aktive reagis kaj la granda plimulto tre interesiĝis. Ni esperas je plua kontakto kun la koncernaj klasoj dum pli longa prezento (2-hora). Estis interese ankaŭ informi la studentojn, eĉ se nia eta ekspozicio ne estis sufiĉe vizitata.

Renée TRIOLLE (triolle.renee@wanadoo.fr)

Ganao



Okazis Zamenhofa Tago en la lernejo Lutheran kune kun klubanoj en la lernejo, teamo de ILEI-Ganao kaj instruistoj en la sama lernejo. La speciala gasto estis s-ro Paul Kwesi Mensah, kiu prelegis pri D-ro L. L. Zamenhof. Ni kune kantis la kanton „Bona Amiko”. Ni poste interbabilis kun niaj lernantoj, ili starigis diversajn demandojn pri Esperanto. Ni jam instruas Esperanton ekde sep semajnoj ĉe la lernejo Lutheran, unu horon semajne. Estas plano prepari la lernantojn por trapasi A1-ekzamenon. Ni nuntempe serĉas ankaŭ oportunon kunlabori kun aliaj lernejoj, kie oni instruas Esperanton, por ke niaj lernantoj havu okazon interbabili rete kaj

koresponde. Jen la poŝtadreso de la lernejo: *Esperanto-Klubo, St. Paul's Lutheran School, PMB 78, Accra North, Ghana.*

Hungario

Asembleo de hungaraj esperantistaj pedagogoj

La 29-an de oktobro la jure registrita Asocio de Hungaraj Esperantistaj Pedagogoj (EPME) havis asembleon en Budapeŝto. La 11 ĉeestantoj akceptis la financon kaj fakan raportojn de la estraro kaj poste ili elektis novan estraron por la sekvaj 5 jaroj (ĝis 2028). Fakte ĉiuj tri estraranoj reelektiĝis, nome: Pálma Salomon Csiszár, József Eszényi kaj József Németh. La estraranoj interkonsentis, ke la prezidanto restos József Németh, kiu plenumas tiun taskon jam ekde 1996. Pasintjare la asocio havis 35 membrojn.

József NÉMETH

Italio

Zamenhofa Tago en Parma



En la malgranda legoĉambreto de nia sidejo en la strato Sankta Leonardo 47, la tago de Zamenhof estis festita en ĝoja kaj kristnaska etoso. La ĉeesto de amikoj el la proksima urbo Modeno: Ermanno Tarracchini, Laura Barbieri kaj Fulvia Sighinolfi, ege riĉigis la feston. Jen la videoj de la Bona Filmfestivalo de EsperantoUSA, kiuj estis projekciitaj: „Forkapto”, „Ni Ludu Plu”, „Eta Kato” kaj aliaj, krom kompreneble nia kontribuo al ĝi per la filmeto „La Lumo de la Estonto”. Tio estis fonto de diskuto kaj amuzo same kiel la legaĵoj proponitaj de nia instruistino Luiĝa Oberrauch por la Tago de la Esperanta Libro de ILEI: *La teorio Nakamura* kaj la eseo de Julius Glück. Manĝaĵo ankaŭ ludis gravan rolon en unuigado kaj ĝojado de la spiritoj: paca manĝaĵo, strikte vegetara. Por la grupo Canuto en Parmo, renkontiĝi sabate posttagmeze en la klasĉambro fariĝis preskaŭ rito aŭ kutimo, kiu permesas al ni teksi fadenojn de amikeco kaj inkludo danke al la engaĝiĝo kaj al la ĉiam pli bonaj kukoj de nia amikino Emanuela De Bernardi.

Patrizia RIVALDI

Kenjo



Meze de decembro 2023 ni havis nian unuan renkontiĝon por varbi novajn instruistojn. La ekzistantaj kluboj estas Bungoma Esperanto-klubo, gvidata de Gilbert Simiyu, Najrobia Esperanto-klubo gvidata de Elias Kabura, Mombasa Esperanto-klubo de Cendric Irakoze kaj Lodwar-Esperanto-klubo de Bucumi Propero.

La nura problemo estas la manko de lernomaterialoj, legolibroj kaj aliaj necesaj materialoj: ĉiuj helpoj estas bonvenaj. La nunaj instruistoj estas Wifred Juma Elias Kabura, Cédrick Irakoze, Julius Kirwa kaj la katedrestro Gilbert Simiyu Sikala.

Gilbert SIMIYU SIKALA, sekciestro

DR Kongo

Artikolo por IPR, oktobro 2023

Ni daŭre tenas alte la E-standardon en Rutshuru, spite de neelteneble longedaŭra milito en nia regiono. Eĉ nun ni spertas teruron en la vilaĝoj ĉirkaŭantaj mian loĝlokon Kiwanja. Fuĝintoj multas ĉi tie kaj ĉiuj esperas pri baldaŭa reboniĝo de la situacio kaj hejmenreveno.

Diskonigi kaj instrui Esperanton estas la du ĉefaj motoroj, kiuj pluvivigas nian lingvon de generacioj al generacioj, do por tio ni, en Rutshuru, aŭdacas plenumi tiun noblan laboron, ĉar se ne ni, kiu farus tion? Ni agadas singardeme por ne riski malfeliĉaĵojn, la sekureca situacio estas ĉiam treege malfavora ĉi tie, cetere de pluraj jardekoj!

Esperanto ekzistas en Rutshuru danke al sindonemo de la duopo: Honoré Sebuho (en Rutshuru-centro) kaj Joel Muhire (el la proksima urbeto Kiwanja). Sinjoro Honoré starigis la klubon „Verda-Stelano-Klubo (VSK)” en Rutshuru en 2009, sed jarojn poste li kreis infanan grupeton, nome „Ĉiam Antaŭen” kaj sukcesis enkonduki Esperanton en la instituton Njili de la Preĝeja Komunumo CEBCE.

Ekde 2010, mi (Joel) provas disvastigi Esperanton diversmaniere. Unue per rekta transdono de priesperantaj klarigoj al geamikoj, utiligante la revuojn *Esperanto* kaj *Monato* kaj due per lokaj radiostacioj de 2012, sinsekve per RACOU FM, ALLIANCE FM, RACOVE FM, RTEDH FM. Tamen ne multaj kuraĝas serioze eklerni Esperanton, ĉar ĝi ankoraŭ estas nova en Rutshuru. Feliĉe, multaj jam konscias pri la ekzisto de nia lingvo kaj espereble unuj post aliaj ekdecidos iam veni al la movado. La elsendoj



bedaŭrinde ne plu okazas ekde 2022 – mi timis kaj decidis intertempe ĉesigi la instrucelajn elsendojn per RTEDH FM. Alia klopodo pluvivigi Esperanton en la orfejo Njiwa fiaskis parte pro la sama kaŭzo, sed ankaŭ pro la longa distanco de mia hejmo. En junio 2017 mi kreis la klubon „Rondo Esperantista de Kiwanja” (REK), kaj ĝi enhavas nun 24 aktivajn membrojn, se ne kalkuli ĉiujn, kiuj gustumis Esperanton kaj foriris. Kelkaj el la aktivaj REK-anoj fuĝis al Goma kaj en alian teritorion Lubero pro la ĉiutaga malpaco. Rigardu nian filmon *Kvazaŭ korpo sen koro* sur Jutubo pri la malsekureco en la orienta parto de Kongo. Mia intervjuo aperis en tiu ĉi revuo, vidu en la *Jarkolekto* 52 – *trimonata* 2022/2, *paĝoj* 14 kaj 15.

Por povi multobligi la nombron de E-parolantoj kaj tiel disvastigi E-on tra la urbeto Kiwanja, mi instigis ĉiujn kapablajn klubanojn starigi apartajn klubetojn, kaj jen, la naskiĝo de *Nyongera E-Klubo* gvidata de Machumu Bienfaits kaj *Verda Renaskiĝo-Klubo* gvidata de Kambale Amani, la akrobato. Aldone al tiuj du kluboj, menciindas alia, nome *Kasasa Esperanto-Klubo* prizorgata de sinjoro Prime Nsabimana.

La REK-anoj kutime renkontiĝis ĉiujn monatfinajn dimanĉojn, sed, pro la nun malpliboniĝinta situacio, ne plu eblas okazigi tiajn renkontiĝojn, ni ja devas zorgi pri ni mem.

Venontjare okazos la unika Universala Kongreso de Esperanto en Aruŝo, Tanzanio. La plejparto de niaj kamaradoj preparas sin por tiu grandioza unuafoja UK en Afriko. Mia patro Salomon Ndaziboneye ne volas maltrafi tiun kongreson, li decidis eklerni Esperanton ankaŭ en sia 69-jaraĝo kune kun kvin aliaj komencantoj en mia hejmo. Krom instruado de Esperanto, en la E-movado mi agas ankaŭ kiel muzikisto.

Joel MUHIRE (Joe Mo)

Serbio

Zamenhof-tagaj festoj tra Serbio, ekzameno kaj seminarioj

Esperantistoj en Serbio decembre 2023 organizis Zamenhof-tagajn festojn en kvar urboj: Uĵice, Vrŝac, Senta kaj Beograd. Ĉiuj eventoj estis malfermitaj ankaŭ por la neesperantistaro, sed la plej sukcesa – laŭ la nombro de neesperantista publiko (precipe mezlernejanoj) – estis tiu en Uĵice, kiam la ĉeforganizantino, Dragana DUĈIĆ, okazigis eventon en la Nacia Biblioteko kunliginte la Tagon de la E-Libro kun la Internacia Tago por Egalaj Rajtoj de Handikapuloj.

Kontribuantoj de tiu ĉi festa programo estis ankaŭ Radojica PETROVIĆ kaj Nedeljka LOŴAJIĆ. Lokaj televidoj de Uĵice kaj la najbara Ĉaĉak intervjuis partoprenantojn kaj raportis pri la evento.

En la Urba Biblioteko de Vrŝac, Lorijan POPI organizis Zamenhof-tagan programon kune kun Nedeljka LOŴAJIĆ, Zlatoje MARTINOV kaj Jovan ZARKOVIĆ.

Ilona KAJARI, esperantistino el Senta, organizis tradician renkontiĝon „Verdaj Amikaj Tagoj”, finance subtenatan de la urbo, pri Esperanto kaj pri Geza TRIPOLSKY, famulo de Senta (neesperantisto). La kvara festo de la

Tago de la E-Libro (en Beogrado), organizata de Nedeljka, estis specifa pro la fakto, ke antaŭ ĝi la **Sekcio de Esperantistaj Instruistoj en Serbio (SEIS) okazigis ĉeestan A2-nivelan ekzamenon por du pasintjaraj kursfinintoj**, kiuj ne povis partopreni la ekzamenon en junio kun aliaj 6 kandidatoj.

La festan programon plialtigis la solena enmanigo de atestiloj por la sukcese trapasintaj ekzamenoj de la A2-paroliga kurso (*vd surfote*).

Krome, okazis libroprezentoj (Jovan ZARKOVIĆ, Aranka LASLO), anonco de la rezultoj de la poemtraduka konkurso, deklamado (Danijela PETROVIĆ, Dragana DUČIĆ, Dragica MILANOVIĆ) kaj kantado kun gitaro, en Esperanto (Nedeljka LOŽAJIĆ), kaj fine, amikulado.

Inter la 6-a kaj 10-a de novembro 2023, **Vuk MLADENOVIĆ, estro de la Junulara sekcio de Serbia E-Ligo,**

partoprenis seminarion en Budapeŝto (Hungario), organizitan deflanke de TEJO, kunlabore kun Konsilio de Eŭropo.

La titolo de tiu dulingva trejnado estis: „*Junularaj Perspektivoj: Rediscussing intercultural dialogue and non-violent communication among young people*”. (Rediskutado de interkultura dialogo kaj neperforta komunikado inter gejunuloj).

Samtempe, **en Kopaonik** (Serbio) du junaj esperantistinoj – **Dejana RAKIĆ kaj Danijela POPOVIĆ** – **partoprenis serblingvan trejnadon de la Konsilio de Eŭropo** pri edukado de junuloj de Serbio pri homaj rajtoj.



Aranka LASLO

Tajvano

Atesto de la Instruisto de la Jaro al Liru Chen

Dum la ceremonio de la Fermo de la ĉi-jara ILEI-Kongreso, kiu okazis hibride, la unua Atestilo de ILEI por la „Instruisto de la Jaro” estis virtuale donita al d-ino Liru Chen fare de prof. Renato Corsetti.²

La fizikan transdonon de la Atesto faris Reza Kheirkhah, ILEI-representanto en Tajvano. Jen lia raporto pri tio:

La 11-an de Septembro 2023 okazis Monata Kunveno en Pingtung, suda urbo en Tajvano. La temo de la kunveno estis „Iĉingo”³, orakola kvarmil-jara ĉina libro. En la kunveno partoprenis ĉirkaŭ 10 personoj, inter kiuj estis esperantistoj el Kanado, Francio, Irano kaj kompreneble Tajvano. En la fino de la kunveno Reza deflanke de ILEI donis la Ateston de la „Esperantisto de la jaro” al d-ino Liru Chen, kiu ĉeestis la kunvenon kiel kutime.



² La registraĵo de la Fermo estas spektebla en la jutuba kanalo de ILEI:

https://www.youtube.com/watch?v=S9DXcuUCQdE&list=PLufbtAhDHic2Jc2uRKVbo_mGRh_EiB4oj&index=66 . La virtualan transdonon de la atestilo oni povas spekti ekde la 21-a minuto de la registraĵo.

³ https://eo.wikipedia.org/wiki/I_Ching

Ŝi eklernis Esperanton antaŭ ĉirkaŭ 10 jaroj kaj post du jaroj jam komencis mond-vojaĝadon kaj partoprenadon en diversaj UK-j, i.a. tiun en Francio (2015). Ŝi estas membro de Pasporta Servo kaj eksa instruisto de la angla lingvo en fame konata ŝtata elementa lernejo. Ŝi fakte pli frue emeritigis sin por havi pli da tempo por dediĉi al Esperanto kaj ankaŭ samtempe pli facile daŭrigi sian studadon de la doktoriĝa grado rilate al infana edukado. Pasintjare ŝi sukcese finis la studadon.

Fakte ŝi estas nun la ĉefa motoro de tajvana Movado kaj ŝia nuna plej grava agado estas la okazigado de retaj kursoj dufoje semajne. Ŝi ankaŭ instigas kaj trejnas junajn esperantistojn por fari tian laboron.

Cetere ankaŭ ŝia familio estas „verda”: du filoj kaj la patro lernis Esperanton iugrade kaj unu el la filoj (kies universitata fako estas la hispana) eĉ partoprenis en UK kaj IJK antaŭ kelkaj jaroj. Ŝi estas membro de UEA jam de jaroj kaj abonanto de *Juna Amiko*. Krome ŝi organizis komunajn staĝojn kun koreaj samideanoj. Ŝi mem vojaĝis al Koreio tiucele kaj ankaŭ por partopreno en la Pusana ILEI-kongreso. Sen Liru, la tajvana Movado certe ne estus tia, kia ĝi estas hodiaŭ!

Reza KHEIRKHAH

Pri LA TEORIO NAKAMURA - Intervjuo kun Anna Löwenstein⁴

de Alessandra MADELLA

En 2023 Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) proponas du mallongajn verkojn por la komuna legado dum la Tago de la Esperanta Libro, kiun oni tradicie festas la 15-an de Decembro. Progresintoj povos diskuti la kleran eseon LA GRANDAJ FILOZOFOJ KAJ LA UNIVERSALA LINGVO (1937) de Julius Glück, tre aktiva Esperanto-instruisto murdita en Auschwitz. Komencantoj povos ĝui la unuajn tri ĉapitrojn de LA TEORIO NAKAMURA (2018) de Anna Löwenstein (*vd surfote*), bazo de la fama kurso de lernu.net kaj plejlaste eldonita kiel libro de eldonejo Espero en 2022. Anna tre afable konsentis respondi al niaj demandoj pri tiu verko.



⁴ Fonto:

<https://esperanto.cri.cn/2023/12/14/ARTIpJksnBjcappri2I82mjo231214.shtml>

AL: Anna Löwenstein
AM: Alessandra Madella

AM: Kio estas LA TEORIO NAKAMURA?

AL: Ĝi estas rakonto, kiun mi verkis por homoj, kiuj lernas Esperanton. Ĝi komenciĝas tre facile, uzante en la unua ĉapitro nur tre malmultajn vortojn kaj simplan gramatikon. En ĉiu ĉapitro aldoniĝas novaj vortoj kaj gramatiko, tiel ke iom post iom ĝi fariĝas pli malfacila. Sed ĝenerale ĝi estas tre facila rakonto, taŭga por lernantoj.

AM: Kiel vi decidis verki scienc-fikcian rakonton por komencantoj?

AL: Mi ne mem decidis fari tion. La retejo *lernu.net*, kiu ekzistas por instrui Esperanton al komencantoj, kontaktis min kaj invitis min verki rakonton. Oni volis renovigi la retejon, komencante per nova rakonto, sur kiu estos bazitaj la gramatiko kaj la ekzercoj. Sed kiam oni proponis tion al mi, mia unua reago estis rifuzi, ĉar mi tiam okupiĝis pri mia tria romano, kiu postulis sufiĉe multe da tempo. Poste mi pensis, ke tamen tio estas grava laboro, ĉar *lernu.net* estas tre grava retejo por lernantoj – precipe tiam, kiam ankoraŭ ne ekzistis Duolingo. Do, mi akceptis la proponon.

Fakte, la homoj de *lernu.net* proponis al mi, ke mi verku scienc-fikcian rakonton. Ili sugestis plurajn ideojn, inter kiuj plaĉis al mi la ideo de tempo-vojaĝado.

AM: Kiel vi komparas verki LA TEORIO NAKAMURA kun viaj aliaj romanoj?

AL: Miaj romanoj estas tre grandaj verkoj. Ĉiu el ili postulis kelkajn jarojn por la verkado. LA TEORIO NAKAMURA estas malgranda rakonto, por kiu mi bezonis nur kelkajn monatojn. Komplikaĵo estas, ke mi ne povis libere uzi lingvaĵon aŭ skribi ion ajn. Mi devis iom post iom konstrui la tekston, aldonante pli da vortprovizo kaj gramatikaj eroj en ĉiu ĉapitro. Sed mi jam kutimis fari tion, ĉar mi instruis Esperanton de multaj jaroj. Krome, pli frue mi estis redaktoro de la facila parto de KONTAKTO kaj mi jam kutimis verki tre simplajn tekstojn per facila lingvaĵo. Do, por mi estis multe pli facile verki tiun mallongan rakonton ol verki LA MEMORAĴOJ DE JULIA AGRIPINA (2021), mian lastan romanon.

AM: Kiel vi priskribus la koncepton de tempo en LA TEORIO NAKAMURA?

AL: Ĝi estas rakonto pri tempo-vojaĝado, kiu okazas en tri tempo-periodoj. Ĝi komenciĝas en la jaro 1982, kiam estas la juna Filipino Nakamura. Alvenas viro en tempo-maŝino, kiu montriĝas esti la sama Filipino Nakamura, sed tridek jarojn poste, el la jaro 2012. Tiel vi scias, cetere, ke mi verkis tiun rakonton en la jaro 2012. Poste li vizitas la estontecon: li vojaĝas al la jaro 2182, 200 jarojn post kiam la rakonto komenciĝas.

Estis multe pli facile verki tion ol miajn historiajn romanojn. La fantazio estis pli libera, ĉar mi verkis pri la estonteco kaj mi povis imagi ĝin laŭ mia deziro. Mi ne devis fari esplorojn pri la historia realeco.

AM: Ĉu vi verkus ĝin malsame post la kronviro pandemio?


AL: Fakte, ne. Neniu tiam antaŭvidis pandemion en la baldaŭa estonteco, sed mi ne verkus ion malsaman nun. Estis problemo iugrade, ke ĝi estis tre fiksita al difinitaj jaroj, ĉar poste ĝi ne aperis ĝis 2018. Mi verkis la rakonton en 2012, sed poste aliaj homoj okupiĝis pri la gramatikaj klarigoj, la ekzercoj, kreado de la retejo ktp. Do, la afero daŭris kelkajn jarojn, kaj la dato 2012 ne plu estis aktuala. Tamen, la rakonto estis tiel fiksita al difinitaj jaroj, ke poste mi ne povis facile ŝanĝi tion.

AM: LA TEORIO NAKAMURA naskiĝis por la reto kaj poste iĝis libro, ĉu ne?

AL: Jes, ĝi estis verkita por la reto. La ekzercoj kaj la gramatikaj klarigoj estis bazitaj sur la rakonto, kaj tial la sinsekvo de la instrueroj estas iom nekutima. Ekzemple, oni tre frue enkondukas la “os-tempon”: “ni iros”, “ni vojaĝos al la jaro 2182” kaj simile. Kutime en lingvo-kursoj oni instruas la “os-tempon” pli malfrue. Sed por la celoj de ĉi tiu rakonto, tio devis veni tre frue. Aliflanke, ne estas komplike lerni tiun tempon en Esperanto. Mi memoras, ke mi bezonis semajnojn por lerni la “os-tempon”, kiam mi lernis la francan. Sed en Esperanto oni povas lerni en du sekundoj, ke la verboj finiĝas per “os” anstataŭ per “as”. Simile, pro la neceso uzi datojn, jam en la unua leciono aperas la jaro 1982. Tial jam en la unua leciono oni instruas la nombrojn kaj kiel esprimi grandajn nombrojn.

Mi povas aldoni, ke mi ricevis liston de temoj, kiujn mi devis trakti en la rakonto, ĉar oni volis pretigi la lernantojn por la nivelo B1 de la KER-

ekzamenoj. Ekzemple, oni devis lerni kiel prezenti sin, kiel paroli pri siaj intereso kaj hobiaj. Oni devis scii kiel mendi manĝon en restoracio, kiel iri al vendejo, iri al kuracisto. Tiu listo de temoj iugrade decidis la direkton de la rakonto. Iel, eĉ se ne detale, mi devis enmeti ĉiujn el ili. Kaj mi malkovris, ke tempo-vojaĝado igas tion pli interesa. Ofte en lingvaj kursoj estas ĉapitro, en kiu oni iras en restoracion kaj mendas manĝon, aŭ devas iri al la kuracisto. Tio ne estas en si mem aparte interesa. Sed, se oni faras tion en la jaro 2182, same necesas aĉeti la manĝon aŭ la bileton por la kinejo, sed la tuta ĉirkaŭaĵo estas malsama. Do, oni povas lerni tiujn samajn bezonatajn strukturojn en pli interesa kunteksto. Mi malkovris dum mi faris, ke tio estas avantaĝo de la fakto, ke temas pri tempo-vojaĝado.



AM: Kiuj estis la plej interesaj komentoj de legantoj?

AL: La plej interesa komento venis de mia filo Fabiano. Ĉar li estas fizikisto, mi foje petis liajn konsilojn pri tempo-vojaĝado. Li ankaŭ parolas E-on, kompreneble, kaj li estis mia unua leganto. Mi povas menci, ke, dum mi verkis la rakonton, li rekomendis al mi spekti la popularan filmon REEN AL LA ESTONTECO (*BACK TO THE FUTURE*, 1985), ĉar ankaŭ ĝi temas pri tempo-vojaĝado. Do, mi spektis tion, dum mi verkis la rakonton. Post kiam mi publikigis ĝin, Fabiano

komentis, ke ĝi enhavas difinitan specon de tempo-paradokso. Homo de la estonteco venas al la pasinteco kaj instruas kiel konstrui tempo-maŝinon kaj la sciencajn sciojn necesajn por fari tion. Tiel la fizikisto en la pasinteco konstruas la tempo-maŝinon, verkas artikolojn pri tiu scienca teorio, kaj instruas ĝin al aliaj homoj. Tio estas cirkla situacio, en kiu oni povas demandi

sin, de kie venas tiu teorio, ĉar la homo de la estonteco instruas ĝin al la homo de la pasinteco kaj tial en la estonteco oni scias pri ĝi.

AM: Kiuj estas viaj nuntempaj projektoj kaj ĉu vi planas denove verki ion por komencantoj?

AL: Mi kompreneble daŭre verkas por komencantoj, ĉar mi estas redaktoro de la retejo *uea.facila*. Denove, mi ne aparte volis fari tion, sed ŝajnis al mi tre grave, ke UEA prezentu sin al novaj esperantistoj. Necesas fari tion per simpla lingvaĵo kaj tial mi kreis la retejon *uea.facila*. La tuta retejo estas verkita per simpla lingvaĵo kaj tio estas tre granda tasko, ĉar mi klopodas aldoni almenaŭ unu novan artikolon ĉiu-semajne. Mi ne ĉiam sukcesas, sed estas ĉiam almenaŭ 4 ĝis 6 novaj artikoloj ĉiumonate. Tio estas tre temporaba, kompreneble. Mi ne provas verki novan romanon en la nuna momento. Se iu donus al mi ideon, mi eble provus verki plian novelon por komencantoj kiel LA TEORIO NAKAMURA. Sed mi bezonus la instigon, ĉar eble mi ne estus verkinta ĝin, se la homoj de *lernu.net* ne estus donintaj al mi la ideon.

Mi povas menci, ke en ĉi tiu periodo mi verkas kelkajn „romanetojn” en la angla por verkista grupo. Ili estas iom pli longaj ol noveloj, sed pli mallongaj ol romanoj. La grupo renkontiĝas rete en ĉiu dua semajno kaj mi ĉiam devas verki ion por ĝi. Tiuj rakontoj devus esti mallongaj, sed mi ne kapablas verki mallonge. Miaj rakontoj daŭras de unu kunveno ĝis la posta, eĉ dum kelkaj monatoj. Do, iom post iom mi konstruas tutan romaneton. Pro manko de tempo mi verkas novajn aferojn tre malrapide, iom post iom aldonante. Sed eble tio ne estas malbona. Ĝi donas tempon por pensi kaj por ke la afero mem evoluu. Mi nun estas en la tria rakonto. Ili ĉiuj estas iom fantaziaj, kun historia elemento. Mi verkas ilin en la angla, ĉar mi faras tion por anglalingva grupo. Sed mi nun pensas: Nu, ili ne estas malbonaj rakontoj, kial ne traduki ilin? Do, espereble post du jaroj povos aperi libro de du aŭ tri romanetoj verkitaj de mi, kiuj estos tute malsamaj de la historiaj romanoj. Eble iom pli similaj al LA TEORIO NAKAMURA, kvankam ne per facila lingvaĵo. Krom tio, en ĉi tiu periodo mi tradukas anglalingvan romanon (ne verkitan de mi mem) en Esperanton. Mi esperas, ke ni ricevos permeson de la eldonejo, ĉar mi jam tradukis duonon de la libro.

ALVOKO PARTOPRENI EN LA 57-a ILEI-KONGRESO kaj SIMPOZIO



La 57-a ILEI-KONGRESO

Tempo: Ekde la 20-a ĝis la 27-a de julio 2024

Loko: Masejoo (Portugale: Maceió), Brazilo

Ĉef-temo de la Kongreso: „Esperanto por justa edukado”

Retejo de la Kongreso: <https://2024.kongreso.org/>

Ĉi-jare ILEI fariĝas 75-jara organizo prezentante grandan servon al nia instruistaro. Kiel ĉiuj scias, krom eldonado de du nepre necesaj revuoj (IPR kaj Juna Amiko), ILEI ĉiujare okazigas gravegan kongreson por ni, instruistoj, ne nur de Esperanto, sed ankaŭ de aliaj lingvoj kaj fakoj. Ni bonvenigas ankaŭ lernantojn, homojn, kiuj interesiĝas pri instruado, kaj ĝenerale ĉiujn esperantistojn de kiu ajn lingvo-nivelo

En 2024, la 57-a Kongreso de ILEI denove okazos hibride: virtuale kaj ankaŭ ĉeeste en la paradiza urbo Maceió (Masejoo), en la nordoriento de Brazilo.

La ĉefa temo de la Kongreso estos: “Esperanto por justa edukado”, kaj certe ĝi vekos la intereson ne nur de esperantistoj, sed ankaŭ de instruistoj de aliaj lingvoj kaj fakoj, universitataj esploristoj kaj profesoroj, ĵurnalistoj kaj ĝenerala publiko; unuvorte, ĉiuj, kiuj iel dediĉas sin aŭ interesiĝas pri la temo, aŭ ĝenerale pri pedagogio.

Ni atendas vian aliĝon kaj viajn kontribuojn pri la kongresa aŭ aliaj pedagogiaj temoj, kaj ankaŭ por la Lingva Festivalo, la Internacia Vespero aŭ aliaj programeroj. Vi povas indiki viajn kontribuojn por nia programo per la aliĝilo (<https://2024.kongreso.org/alighilo.php>) kaj/aŭ per retmesaĝo al: ilei.kongresoj@gmail.com.

La limdato por sendi ilin estas la 31-a de marto 2024, por ke ili estu aldonitaj al la Kongresa Programo. Por ĉiu via propono, ĉu prelego aŭ alispeca kontribuajo, bonvolu sendi al ni (ilei.kongresoj@gmail.com):

1. titolon de la kontribuaĵo;
2. vian kompletan nomon;
3. daŭron de la prezentado;
4. ĉu vi prezentos ĉeeste aŭ rete;
5. du- ĝis maksimume kvin-linian priskribon de la kontribuaĵo;
6. du- ĝis maksimume kvin-linian biografion de vi;
7. vian foton.

Kiel kutime, vi povos ĝui ankaŭ ekskursojn, Lingvan Festivalon, spektaklojn ktp.

Vi trovos ĉiujn detalojn pri la aliĝo en la kongresa retejo: „<https://2024.kongreso.org/>”

La ĉefa temo de la ĉi-jara **ILEI-Simpozio**, estos „**Lingvoj de instruado kaj justa edukado**”.

Venu plibeligi nian kongreson per via ĉeesto kaj aktiva agado. Via partopreno estas tre grava. Bonvenon!

Laura BRAZZABENI
ILEI-Estrarano pri kongresoj

INFORMOJ PRI ILEI

Laborkomisionoj

Ekzamena: Karine Arakelian (*prez., dumtempe pluservanta ĝis la venonta elekto*)

Elekta: Aurora Bute (gvid.), Zsófia Kóródy, Aristophio Alves Filho.

Kontrolo: Simon Smits, Nvard Manveljan.

Lerneja: Julian Hernández, Jennifer Bishop, Ronald Glossop, Marija Jerković, Luigia Oberrauch, Ermanno Tarracchini, Mihai Trifoi.

Regulara: Marija Belošević, Rob Moerbeek, Stefan MacGill.

Terminara: Miroslav Malovec, Ilona Koutny.

Universitata: Duncan Charters (gvid.), Renato Corsetti, Gong Xiaofeng „Arko”, Goro Kimura, Ilona Koutny, Katalin Kováts, Kristin Tytgat, Vicente Manzano-Arrondo, Radojica Petrović, Ivan Colling.

Enmovadaj partneroj (entute 15)

E@I (*Edukado ĉe Interreto*): Víťazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske, Slovakio, info@ikso.net. Tel: (+421) 902 203 369. Retejo: <http://www.ikso.net/eo/>.

Fondaĵo edukado.net - funkciiganta la paĝaron de instruistoj, instruantoj kaj memlernantoj. Direktoro: **Katalin Kováts**, Spaarwaterstraat 74, NL-2593 RP, Den Haag, Nederlando. Retadreso: redaktanto@edukado.net.

ICH (Interkultura Centro Herzberg): Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz, (+49) 55215983. Trejnseioj, metodikaj kursoj, pedagogia fakbiblioteko, internaciaj ekzamenoj, kontaktpersono: **Zsófia Kóródy**, zsafia.korody@esperanto.de.

IFEF (Internacia Fervoĵista Esperanto-Federacio): *vd. la retpaĝon de UEA.*

TEJO (<http://www.tejo.org/>): Observanto de ILEI ĉe TEJO: **Fernando Pita**.

Observanto de TEJO ĉe ILEI: **Albert Stalin Garrido**.

UEA: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando,

www.uea.org. Observanto de ILEI ĉe UEA: **Ahmad Reza Mamduhi**.

Observanto de UEA ĉe ILEI: **Duncan Charters**.

LIBE (Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj): prez. **Nedeljka Ložajić**, nedeljkalozajic@gmail.com.

kaj aliaj

Ekstermovadaj partneroj (entute 8)

ALTE (*Asocio de lingvaj testistoj de Eŭropo*) Repr. de ILEI: **Zsófia Kóródy**.

FIPLV (*Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj*)

UN (kun statuso de observanto): komisiitoj de ILEI: **Rob Moerbeek, Ron Glossop, Leysester Miro**.

Unesko (kun statuso de observanto): Reprezentantoj de ILEI: **Alessandra Madella**, a.madella@tiscali.it, **Didier Janot**, didier.janot@gmail.com, **Emmanuel Desbrières** kaj **Maximiliano Garcia**.

kaj aliaj

Membreco kaj pagado por diversaj servoj

Membreco kostas 25 € en A-landoj kaj 12,50 € en B-landoj, kun ricevo de 4 paperaj kaj bitaj numeroj de IPR jare. Kun aliro nur al la reta versio de IPR membreco kostas 12,50 € por la A-landoj kaj 6,25 € por la B-landoj. Supera membro estas tiu ILEI-membro, kiu mendas paperan IPR kaj paperan *Juna Amiko* (JA). Tio kostas por A-landanoj 40 € kaj por B-landanoj 22,50 €. Abono de JA papera (kune kun la bita) kostas 18 € en A-lando, 13 € en B-lando. Abono de JA bita kostas 11 € en A-lando, 7 € en B-lando. **Lando-kategorioj: B-landoj:** iamaj socialismaj landoj de Eŭropo; ĉiuj landoj de Azio (escepte de Israelo, Japanio kaj Korea Resp.), Afriko, Ameriko (escepte de Usono kaj Kanado), Kiribati, Papuo-Nov-Gvineo, Solomonoj, Vanuatu en Oceanio. **A-landoj:** ĉiuj landoj escepte de tiuj de kategorio B. Bonvenaj estas donacoj al la kaso de ILEI kaj al la fondaĵoj de ILEI. Sekciestroj en trideko da landoj akceptas kotizojn kaj donacojn; simile, perantoj por JA akceptas abonojn enlande.

Por informi pri viaj pagoj, bonvole skribu al **Karine ARAKELJAN**, 33 Khandjian Str., Apt. 4, AM-0010 Erevan, Armenio, ilei.kasisto@gmail.com. Bv klare indiki la celon de via pago.

La pagoj por ILEI povas okazi a) pere de via sekciestro aŭ b) pere de la ILEI-konto ĉe UEA. Jen detaloj:

a) Pagoj al la sekciestro alvenos al ILEI kune kun tiuj de la aliaj membroj de la sekcio. Vi jam estos en la sekcia listo kaj ne devos mem sendi la aliĝ- aŭ la abon-formularon.

b) Pagoj al la konto de ILEI ĉe UEA: ilek-a. Se vi ne mem posedas UEA-konton, por pagi al UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL 3015 BJ Rotterdam, bv uzi: ING Bank, Postbus 1800. NL-1000 BV Amsterdam (konto: 37 89 64; IBAN: NL72INGB0000378964; BIC/SWIFT: INGBNL2A). Bonvolu aldoni € 5 por la nederlandaj bankokostoj. Se vi ne estas en la sekcia listo, bonvolu mem sendi la aliĝ-aŭ la abon-formularon (aliĝilo: <https://www.ilei.info/Aligxilo.pdf>; abon-formularo por *Juna Amiko*: https://www.ilei.info/Juna_Amiko.pdf). Indiku vian nomon kaj vian landon, la celon de via pago kaj la konton de ILEI ĉe UEA: ilek-a. Ĝiri monon el via UEA-konto al la ILEI-konto ĉe UEA estas facila ago.

* Simpla abono de *IPR* sen membreco: 30 €. Reklamtarifoj por *IPR*: 180 € por plena, 110 € por duona, 70 € por kvarona paĝo. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon; kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.

* ILEI estas jure registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Den Haag (NL) sub la numero 27181064 kun sidejo ĉe la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo (NL).

* Retpaĝo de ILEI: <http://www.ilei.info>.

REDAKCIAJ INFORMOJ

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): Marc CUFFEZ, *Torhoutsesteenweg 453/0003, BE-8400 Oostende*. **Teknika helpo**: Stano MARČEK. **Presado**: Alfaprint, Martin, Slovakio. **Redaktoro**: NÉMETH József, *Fő u. 41/5, HU-8531 IHÁSZ, Hungario*, jozefo.nemeth@gmail.com, tel: (+36-70) 931-0530. Peranto de ILEI kadre de LIBE: Olena Poshivana, olenaposivana@gmail.com.

Redaktora noto: la ĝisnuna, limigita retejo de *IPR* (<https://www.ilei.info/ipr/>) baldaŭ ĉesos funkcii. Anstataŭ ĝi ni kreis pli ampleksan arkivon ene de la retejo de ILEI. Ĝia aktuala adreso estas <https://www.ilei.info/revuoj/ipr-arkivo.php>.

*Ni fermis la nunan numeron la 15-an de januaro 2024,
redaktofino por la sekva numero: la 15-an de aprilo 2024.*

SEKCIOJ DE ILEI

Albanio: Bardhyl SELIMI, Rruga Fortuzi, nd.9, h.1, ap. 3, AL-1016 Tirana, bselimi@gmail.com

Armenio: Lida ELBAKJAN, Moldovakan 26/2, kv.52, AM-375062 Erevan, lidaelb@yahoo.com

Barato: Arikapalli Giridhar RAO, Azim Premji University, Survey No. 66, Burugunte Village, Bikkanahalli Main Road, Sarjapura, Bengaluru 562125, India, rao.giridhar@apu.edu.in

Belgio: Marc CUFFEZ, Torhoutsesteenweg 453/0003, BE-8400 Oostende, flandrio@hotmail.be

Brazilo: Aristophio Andrade ALVES FILHO, Rua B-55, N° 85, Conj. B. Bentes 1, Q. B-55, Benedito Bentes, Maceió, AL, Brasil, BR-57085-748, esperantomaceio@yahoo.com.br

Bulgario: Mariana EVLOGIEVA (komitato), ileibg@espereto.com

Burundo: Gilbert NDIHOKUBWAYO, BP 7072 Bujumburo, gigi.kadi@gmail.com

Ĉinio: WEI Yubin „Jado” Baiyangshujie Xiaoxue, Taiyuan Shanxi, CN-030003, ilei_cxinio@163.com

Danio: Ileana SCHRODER, Vestavej 4, DK 2770 Kastrup, ileana.schroder@mail.dk

Francio: Didier JANOT, 3 rue Éliisa Lemonnier, FR-75012 Paris, didier.janot@gmail.com, <https://eventaservo.org/o/ILEI-Francio>

Hungario: József NÉMETH, Fő u. 41/5, HU-8531 Ihász, jozefo.nemeth@gmail.com

Germanio: Zsófia KÓRÓDY, Esperanto-Centro, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg/Harz, zsofia.korody@esperanto.de

Indonezio: Iliia Sumilfia DEWI, Perumahan, Pejuang, Pratama, Blok L, no. 11, RT/RW 003/006, ID-Bekasi, Jawa Barat, ilia.dewi@gmail.com

Irano: Ahmad Reza MAMDUHI, Nr. 9 K. Iraj, Kh. Dowlatshad Gharbi, Kh. Farid-Afshar, Kh. Vahid Dastgerdi, IR-19166-13514 Tehran, mamduhi@gmail.com

Italio: Luigia OBERRAUCH MADELLA, via Prampolini 8, IT-43122 Parma, esperoenparmo2020@yahoo.com

Japanio: ISIKAWA Tiekō, Tate 2-4-4-304, JP-353-0006 Siki-si, Saitama-ken, tiekosanjo_103@bj8.so-net.ne.jp

Kenjo: Gilbert SIMIYU SIKALA, P.O. Box 236-50202 Chwele, Bungoma, Okcidenta, Kenjo, glbsimiyu@gmail.com

Kongo DR: Joel MUHIRE, Po Box 08 ug, Bunagana-kisoro, Ugando, joelmuhire0@gmail.com

Korea Resp.: CHO Weonseok, vivanta58@hanmail.net

Kroatio/KEL: Marija JERKOVIĆ, Jarunska 6, HR-10000 Zagreb, mjerkovic@net.hr

Kroatio/KEU: Svijetlana AKIK, Franje Malnara 52, HR-10000 Zagreb, ilei@hes-keu.hr

Madagaskaro: Miora RAVELOHARISON, Lot II N 59 RA, Bis, Analamahitsy Antananarivo, le.myrhe@gmail.com

Mongolio: Khorloo TSERENDEJID, MN- Ulaanbaatar bayangol district, khoroo 24, 42-1-62, tsarendjd@yahoo.com

Nederlando: Robert MOERBEEK, Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE Beverwijk, moerbeekr@gmail.com

Pollando: Magdalena TATARA, ul. Grzegórzecka 74/4, PL-31-559 Kraków, mtatara@gmail.com

Rumanio: Mihai TRIFOI, Str. Principală, Bl.1 Ap.3, RO-527116 Bixad/Jud. Covasna, mihaitrifo@yahoo.com

Rusio: Elena NADIKOVA, ul. Kadikova, 24-41, RU-428037 Ĉeboksari, lena_espero@mail.ru

Senegalo: Lafi Charles DIATTA, BP 17935 Dakar-Liberté/Dakar, laficharlesd@gmail.com

Serbio: Aranka LASLO, Imotska 34. RS-24000 Subotica, laslo.az@gmail.com

Svedio: Sten SVENONIUS, Vendelsfridskatan 4 c, SE 21764 MALMÖ, ilei-se@outlook.com

Svislando: Mireille GROSJEAN, Chapeau-Rablé 52, CH-2300 La Chaux-de-Fonds, mirejo.mireille@gmail.com

Tanzanio: Mulele Samwel MBASSA, Box 25, Bunda - Tanzanio. Poŝtel: +255786 819 767,
+255758 176 722, mulelembassa@gmail.com

Togolando: KOFFI GBEGLO, 07 BP. 13169 Lome 07, Lomé- TOGO, esp.togo@gmail.com

Ukrainio: Nina DANYLYUK, pr. Sobornosti, 32, Log. 108 UA-43026 U. Lucjk,
nina_daniljuk@ukr.net

Usono kaj Kanado: William B. HARRIS, 4 Edgecomb Ct, Portland ME 04013 USA,
wb_harris@hotmail.com

REPREZENTANTOJ

Aŭstralio / Nov-Zelando: Penelope VOS, 50 Victoria St, Cooma, NSW, Australia,
penny@mondeto.com

Britio: Renato CORSETTI, 22, St. Pancras Court, High Road, London N2 9AE, UK/Britujo,
renato.corsetti@gmx.com

Finnlando: Sylvia HÄMÄLÄINEN, F.E. Sillanpään katu 2 C 46, FI-33230 Tampere,
sylvia.h@kolumbus.fi

Ganao: Alfred Kobina ARTHUR, P.O. Box CT 7432, Cantonments, GH-Accra,
ctregh@gmail.com

Hispanio: Luis Eduardo BERDOR REMON, Pablo Iglesias 41, 4 B, ES-50018 Zaragoza,
eduardo.berdor@gmail.com

Pakistano: Adeel Mahmood BUTT, Ward No. 11, near M.C. High School, PK-39100
Nankana Sahib, interlingvisto@gmail.com

Portugalio: Luna M. SILVA, luna@esperanto.pt

Slovenio: Peter GRBEC, Sv. Peter 142, SI-6333 Sv. Peter, peter.grbec@gmail.com

Tajvano: Reza KHEIRKHAH, Chung Ching Road, No. 105, TW-Pingtung city, 900-73,
rezamenhof@yahoo.com

Vjetnamio: Hoan Thi TRAN, Xom 11 – Yen Loc – Kim Son, VN-430000 Ninh Bính,
hoantran37@gmail.com

Zimbabvo: Benjamin Asende KABWE, Tongogara Post office. P.O. Box 228, Chipinge,
Manicaland, Zimbabwe, benjaminkas52@gmail.com

KONTAKTPERSONOJ

Aŭstrio: Walter KLAG, Vieno, esperanto@chello.at

Benino: Latifou GBADAMASSI, BP302 Lokossa (Mono), République du Benin, Afrique
de l'Ouest, latifougbadamassi@yahoo.fr

Israelo: Luiza CAROL, str. Bnei Binyamin 53, apt 12, Netanya IL-4201997,
luizacarol1947@gmail.com

Kostariko: Hugo MORA POLTRONIERI, Apartado 4981, CR-1000 San José,
tikoguau@gmail.com

Malio: Mbamoussa Keita, <keitambamoussa@yahoo.fr>, BP 2382, Bamako

Litovio: Gražina OPULSKIENĖ, Obuoliuko 42, Mažeikiai LT-89312, grazopul@yahoo.com

Norvegio: Douglas DRAPER Esperanto, Olaf Schous vei 18, NO-0572 Oslo,
oficejo@esperanto.no

Uzbekio: Anatolij IONESOV, P.O. Box 76, UZ-140100 Samarkand, imps86@yahoo.com

Venezuelo: Asociación Venezolana de E-o, Jezer DORANTE, Apartado postal 47675,
Caracas 1041-A, VE, jezerdorante@gmail.com



Supre: Vicrektoro Li Muhai kaj Liu Donghongn. Malsupre: Duncan Charters respondas al la demandoj de la gestudentoj (vd. la artikolon „Zaozhuang-Universitato festis sian Esperanto-Muzeon” sur p. 16.)

